Praha 30. 4. 1949 · Roč. IV · Číslo 4

# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ČSR, Praha XIX/7 - 7075. — Redaktas Dr Stanislav Kamarýt.

## Propagovat nebo učit?

Slovo propagace má někdy přízvuk snižující. Znamenalo to původně šíření vlastního přesvědčení, hlásání nových idei. Velmi se chtěla propaganda odlišovati od reklamy. Za prvé světové války a za mírové konference Versailleské všechny národy, kmeny a skupiny hlásily se o své právo propagandou. Vyprávěly se pak mezi oběma válkami dojemné historky o oddaných propagandistech a propagandistkách vlastního národa. Tvůrcové mírové smlouvy však často vzdychali nad výsledky propagandy, omlouvajíce nedostatky svého díla přehnanou propagandou národů, z nichž každý chtěl dostat území co největší, dodávaje pro to svojí výtečnou propagandou znamenité důkazy.

Snad proto vznikla k slovu propaganda a k propagandě i nejvznešenějších idei nedůvěra a nechuť. Mudráci vyhlašovali za znak své výtečnosti, že nedají na propagandu.

Po této válce je záhodno, abychom si my esperantisté povšimli, že idea socialismu, která obrací doslova celý svět, nebyla propagována. Socialismus byl dokazován a bylo zaň bojováno. Propagován byl fašismus. Kde je však tisíciletá Třetí říše Goebbelsem tak znamenitě propagovaná? A naproti tomu jakou garancií pro světový mír je idea socialismu, která nebyla propagována, ale za níž se bojovalo, protože její pravdivost byla dokazována z empirie, ze zkušenosti!

Propaganda, která přehání, škodí idei, jíž chce sloužiti. Je to právě ta propaganda, k níž vznikla mezi dvěma válkami nedůvěra. Snahy o zlepšení vzdělanostní organisace lidstva jsou snahy celou svojí podstatou vědecké. Racionalismus je jediným možným podkladem a nástrojem jejich postupu. Proto nic jim neškodí více než lež. A přehánění propagandistické má ke lži velmi blízko. Kde je 40milionový stát Mančukuo přes svou znamenitou propagandu, k níž používal i esperanta? Toho bychom měli býti my esperantisté vždy pamětlivi. Esperanto je třeba šířit tím, že dokazujeme jeho vhodnost jako pomocného mezinárodního jazyka, že dokazujeme, oč snáze lze nabýti jeho aktivní znalosti než jazyka cizího, jak je esperanto rozvinuto po stránce jazykové a jeho užívání po stránce organisační, co znamená idealismus esperantistů (že to není víra v zázračnost dění, nýbrž obětavost k práci na efektivním zlepšování organisace lidské společnosti se stránky kulturní, pro niž je nám právem příkladem obětavost bojovníků socialistických), ukazujeme, jak je hnutí naše lidové, jak jeho neutralita neznamená lhostejnost k pokroku, ale samozřejmou upotřebitelnost esperanta ke každému sdělovacímu účelu, ale jak esperantisté jsou ve své veliké většině lidoví a pokrokoví.

Skutečně, Pythagorovu větu ani Newtonův zákon nelze propagovat, těm lze »pouze« učit. Úkolem učitelů je nalézti methody, aby vědeckým poznatkům učili dobře a rychle. Úkoly esperantistů jsou docela obdobné. Podmínkou k tomu je, aby esperantisté znali jazyk co možná dobře. V tom je velmi významná složka úspěšné »propagandy«. S. K.

*Jan Mukařovský, rektoro de Karlo-universitato:*

## Socialista partiemo en scienco kaj arto

Preskaŭ ĉiuj ĝisnunaj profesiaj kulturantoj de la scienco estis edukataj per imago, ke la scienco, pri kiu ili okupiĝas, devas esti nepolitika kaj senklasa kaj ke eĉ la ete eta nuanco de interligiteco inter la scienco kaj eksterscienca interesiĝo malutilus sciencecon de esplorado. Sed hodiaŭ estas jam klare, ke la tiel nomita nepartiema scienco estas same fiktiva kiel t. n. nepartiema arto. T. n. senpartieco estas nura maskita partiemo, eĉ kiam tre ofte la sciencisto estas sincere konvinkita pri superklaseco kaj nepolitikeco de sciencaj demandoj, kiujn li prezentas, kaj de respondoj, kiujn li donas, havas la senpartieco de la scienco unusolan celon: konvinki la tutan socion, ke interesoj de unusola klaso estas interesoj de ĉiuj. Estas tial danĝere, por scienco danĝere, lasi iun ajn konkludon de la „senpartia" scienco pri la arto sen reesploro. Kiam ajn ni en konkretaj kazoj tian reesploron efektivigos, ĉiam montriĝos, ke malantaŭ fenomenoj, kiujn la „senpartia" esploro rigardis kiel pure artismajn, aktivis lastinstance kaŭzoj ekonomiaj, dependaj de disvolvo de rilataj produktaj, alivorte: proprulaj, kaj ke ŝajne pure artisma ma-

nifestiĝo estis ĉe sia estiĝo destinita por tio, ke ĝi tiun disvolvon kaj kun ĝi ligitan evoluon influu ĉu pozitive ĉu negative.

Ankaŭ por la estinto estas bezone supozi kiel ekstreme gravan faktoron de evoluo aktivan partoprenon de la arto en socia evoluo. Estos tre ofte bezone malkovradi efektivan partiemon de la arto sub la pretendata indiferenteco, sub la tiel nomita supertempeco, sub fikcio de tuthomara valideco. Se estas tiu serĉado sukcesonta, estos bezone, ke la esploranto mem ne droniĝu en necerteco pri la plej propra destino de l'arto. Li devas aliri sian laboron kun konscio, ke celo de la historia evoluo estas forigi subpremon de homo fare de homo, konkrete dirite: ke la evoluo necese fine alvenos al venko de klaso, kiu estis ĝisnun la plej ekspluatata kaj kiu kiel portanto de la plej progresinta produktado estas socio-bazo, de la klaso laborista. Nur tiam havos la esploro firman apogon en tiu ĉi kono, se ĝi kapablos distingi ekzemple abstraktan humanismon, kiu sian neintereson pri la homo vualas per projekciado de homaj aferoj al dimensioj kosmaj, de humanismo konkreta, aktiva kaj batalema. Nur tiam scipovos la esploranto koni en tiu unua humanismo fenomenon interrilatantan senpere aŭ pere kun bezonoj de kapitalismo, en la dua fenomenon servantan komplete aŭ almenaŭ parte al la laborista klaso. El la partiemo eliros tiel kono objektiva, kiu estas, kiel ni vidis, rifuzita al la scienco nepartiema.

Socialisma partiemo devigas ankaŭ eĉ sciencon pri l' arto, ke ĝi efektive partoprenu en klopodado envicigi l'arton en lukton por disvolvo de la socio. Scienco pri l'arto ne rajtas jam disigi arton kaj la vivon, sed devas ilin ambaŭ kunigi. Teoriisto de l'arto estonte vidos, kaj tio estos por plia scienceco de lia esplora procedo, la arton kiel komponanton de luktado por pli bona estonteco de la socio; ĝia tasko estos transpreni riskon antaŭvidadi venontajn taskojn, kiujn la arto ricevados en pluaj etapoj de klopodado por komplete efektivigi socialismon. Aktiva partopreno en antaŭvidado de estonta arto-evoluo emfazas nature intiman ligitecon inter la scienco pri l'arto kaj priarta kaj priliteratura kritiko. Tiu ĉi ligo estis ĉiam tre tuŝproksima, sed kun alveno de la socialista partiemo la korelacio inter kritiko kaj artoteorio transformiĝas principe. Iam la estetiko kontraste al la kritiko reklamaciis por si starpunkton de nepartoprenanta partio, limigadis sian agadsferon nur por konstatadi faktojn kaj tiradi konkludojn el ili; al kritiko estis agnoskata rajto kaj devo meti postulojn al l'arto. Tiu ĉi divido de la taskoj estas erara: konflikton inter konstato kaj fiksado de valoro — nur ŝajne nesolvebla — solvas partiemo de la scienco pri l'arto kaj kompreneble ankaŭ de la kritiko per maniero definitiva. Partiema koncepto taksas ja necese ĉiun fakton jam en la momento, kiam ĝi ĝin konstatas, sed ĝi fiksas ĝian valoron per mezurilo perfekte objektiva, ĉar tiu mezurilo estas deduktita el la laŭleĝa evoluo de la homhistorio. Lenin en artikoloj tuŝantaj literaturon prezentis brilegajn specimenojn de tia analizo konstatanta same objektive kiom kritike kaj donis tiel genian modelon de socialiste partiema estetiko. Kaj tiel Lenin, kiu en j. 1905 en traktato pri „Partiema organizo kaj partiema literaturo" en la gazeto „Novaja Žiznj" eldiris unuan fojon la postulon de partiemo en la beletristika literaturo, metis dum la tuj sekvintaj jaroj ankaŭ, precipe en siaj traktatoj pri Tolstoj, fundamentojn de socialiste partiema scienco pri l'arto kaj kritiko.

Scienco pri l'arto do enviciĝas ĉe socialista partiemo en la saman vicon, kie staras kritiko kaj la arto mem. Respondeco al la socio, identa sur la hodiaŭa evoluogrado kun socialista partiemo, donas al ili komunan taskon. Serĉadi vojon al kreo de tia arto, kiu en la lasta lukto por efektivigi komplete la socialismon kaj venki restaĵojn el kapitalisma epoko estus efika ilo en konstruado de socialisma estinteco, kiu jam ne estus afero de malvasta rondo de elektitoj, sed fariĝus posedaĵo kaj esprimo de la popolo, arto, kiu renovigus senperan rilaton de la bildo al la bildigata realo. Postuloj tiuj estas ĝeneralaj kaj oni devas veni al ili ĉie, kie la socio ekiris sur vojon al socialismo. En la unua socialista lando en la mondo, Soveta Unio, estis tiuj ĉi principoj jam en j. 1934 resumitaj sub nomon de „socialisma realismo" kaj la soveta arto efektivigis laŭ ilia gvido jam grandan parton de la vojo kaj prezentis perfektajn ekzemplojn de la socialisma realismo. Ĝi disvolvas ĝin eĉ nun senhalte al ĉiam pli alta artisma perfekteco kaj al pli perfekta konformeco al socioevoluo. Modelo de la soveta arto povas al nia arto multon doni. Malgraŭ tio taskoj, antaŭ kiuj staras nia arto, nia scienco kaj nia priarta kritiko, estas en nuna momento grandaj, ĉar ĝuste la socialista partiemo, tendenco fari arton instrumento en lukto por venko de socialismo, postulas por si dedukti estontan vojon el konkretaj supozoj, donitaj per ĝisnuna stato kaj evoluo de nia enlanda arto kaj stato de hodiaŭa enlanda socio kaj hodiaŭaj rilatoj en produktado. Scienco pri l'arto estos ankaŭ ĉe ni sub influo de socialista partiemo starigita antaŭ bonfara neceso enradikiĝi ne sole en la enlanda tradicio scienca sed ankaŭ en la enlanda realo socia kaj ekonomia.

Postulo de socialista partiemo ne nur ne priminacas liberecon de esplorado, sed kontraŭe ĝi trudas al la scienco, ke ĝi venadu al siaj konkludoj ne malatentante diversformecon kaj multformecon de la realo. Difektas do la socialista partiemo nek liberecon de konkludo el scienca esplorado nek ĝian sciencan nivelon, sed plifortigas ambaŭ. Krome ĝi faras la sciencon digna helpanto kaj kunulo de ĉia laboro, per kiu estas konstruata pli bona estonteco de la mondo.

(El inaŭgura rektora prelego.) — Tradukis S. K.

# KRONIKO ENLANDA

**Nia deklaro por Paco-kongreso Pariza.** Ni sendis al la Prepara komitato por Tutmonda Paco-kongreso Pariza en Praha la 29-an de Marto sekvantan leteron:

Centra komitato de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko en sia hodiaŭa kunsido en Praha akceptis jenan manifestacian deklaron por Tutmonda-kongreso en Parizo dum Aprilo preparata de kulturaj laborantoj de la tuta mondo:

Ĉeĥoslovakaj esperantistoj celas el komenco de sia agado helpadi per Esperanto al alproksimiĝo de la nacioj kaj subtenadi ĉe ili nesubiĝantan volon al paco en la tuta mondo kaj precipe inter la kulturaj laborantoj. Ĉeĥoslovakaj esperantistoj salutis kun entuziasmo ideon de la Prepara komitato por la tutmonda Paco-kongreso en Parizo kaj tial ankaŭ en sia hodiaŭa kunsido solene deklaras, ke ili de porpacaj klopodoj en sia ĉiutaga laborado, en korespondado, en esperantligva disaŭdigado per Ĉs. Radio kaj sur mallongaj kaj sur mezaj ondoj, en siaj periodaj presaĵoj kaj okaze de fremdlandaj vizitoj en Ĉeĥoslovakio ne ĉesos, ĉiam kaj sur ĉiu loko subtenos ĉian kulturan strebadon, kiu celas apogi pacon inter la nacioj. Esperantistoj de la tuta mondo jam kompletan sesdekon da jaroj, dum kiuj Esperanto ekzistas, sekvas pac-ideon inter nacioj kaj dum nuna tempo estas precipe esperantistoj ĉeĥoslovakaj, kiuj per sia granda aktiveco atingis signifan internacian starpunkton inter esperantistaj organizaĵoj de la tuta mondo. Ne sole en la fremdlando, ankaŭ ĉe ni dekoj da esperantistoj oferis siajn vivojn en koncentrejoj aŭ revenis kun sano ekrompita kaj multaj el ili kun armilo en mano en partizanaj svarmoj iris akiradi novan liberecon al la nacio. Per sia ĉiutaga esperantlingva elsendo ni fariĝis gvidanta aganto sur la pacokampo kaj ni havas milojn da aŭskultantoj en 30 landoj en Eŭropo kaj ekster Eŭropo, kiuj skribas al ni kaj laŭdas nian laboradon por la mondpaco.

Ni kredas firme kun ĉiuj kulturlaborantoj de la mondo, ke pacon al la mondo oni konservi povas, ke la pacfronto estas multoble pli potenca kaj tago post tago plifortiĝanta, dum la fronto de militprovokistoj, profitemuloj kaj malkuraĝuloj estas bagatele malgranda. Esperantistoj en la Ĉeĥoslovaka respubliko prenis por si taskon per siaj gazetoj „Esperanto-Servo", „Esperantista", „Esperantisto Slovaka", per esperantlingva dissendado regule informi siajn eksterlandajn amikojn pri tiu ĉi realo kaj samtempe sciigi ilin pri konstruado de popol-demokratia ŝtato Ĉeĥoslovaka Respubliko, kiun la popolo administras mem, kaj kiu fariĝas pruvo al la tuta mondo, ke vivo sen kapitalistoj, grandbienuloj kaj eroj vivantaj el laboro de ali-

ulo estas ebla en ĉiu ŝtato. Tiel kreita fronto de laboranta popolo en ĉiu ŝtato estas la plej bona garantio de la mondpaco kaj tiel estos vivo sur internacia kulturkampo pli feliĉa kaj pli ĝoja, kiam la kulturlaborantoj povos uzi unusolan interkomprenilon, internacian lingvon Esperanto, kiun tre volonte lernas la laboranta popolo de la tuta mondo.

Jam ĉe la unua sciigo pri la preparata kongreso ni el propra iniciato vokis per radio ĉiujn landajn esperantistajn asociojn kaj la tutmondan centron Universala Esperanto-Asocio en Londono, ke ili manifestacie aliĝu al la tutmonda pacofronto; ni kredas, ke esperantistoj de la tuta mondo efektive ĝis la lasta silabo plenumos sian devon subteni agadon por la aprila pacokongreso en Parizo.

Tial esperantistoj en Ĉeĥoslovakio stariĝas sin en progreseman tendaron, ĉiu aparte kaj kiel kolektivo, por subteni porpacajn klopodojn de la Prepara Komitato kaj firme kredas, ke tiu granda verko, alportonta prosperon al la tuta homaro, sukcesos kaj ke fortoj de mallumo, kiuj la pacon endanĝerigas, estos forpuŝitaj. Sukceson kaj honoron al la laboro por la mondpaco!

Subskriboj: Prez. Ad. Malík, ĝen. sekretario Jar. Mařík.

**Koncerto en Brno.** La 15-an de Marto aranĝis EK koncertan vesperon de sia anino s-ino Věra Borská en granda salono de hotelo Passage. En la programo estis la plej famaj komponaĵoj de la plej grandaj majstroj ĉeĥaj kaj fremdaj. En dua parto de l'programo kantis Věra Borská en Esperanto Chopin-kantojn, de Dvořák kaj belegan arion de Dalila. La ĉarma artistino plene ravis multnombran publikon kaj rikoltis entuziasman rekonon. En la programo partoprenis violon-virtuozo Jiří Mottl, koncerta majstro de Janáček-operejo en Brno, prezentinte brile komponaĵojn de Beethoven kaj Dvořák. S-ano prof. V. Scheiber ĉe piano trovis grandan admiron ĉe la ĉeestantoj kaj senrezervan laŭdon ĉe kritiko. La kritiko tre bone akceptis la koncerton. Partoprenis 300 personoj, do ankaŭ ekstera sukceso estis tre kontentiga. (J. V.)

**Pri agado en la Plzeň-regiono dum 1948** raportis detale regiona peranto Fr. Kavan. Ne ripetante tion, kio estas jam enskribita en Lokaj informoj, ni enpresas tie ĉi kun aparta laŭdo lian klopodadon pri starigo de distriktaj perantoj en la regiono. En Plasy, kiu fariĝis distrikta urbo anstataŭ Kralovice, funkcias kiel di-pe s-o Gustav Menčík, fervora, entuziasma kaj sindona ano; fondis grupon, instruas novajn samideanojn kaj neniam mankas, se okazas io valora en Plzeň. „Ne tiom kontentige oni povas raporti pri ceteraj 12 distriktoj de la regiono. Nur en 8 estis trovitaj distriktaj perantoj, sed ankoraŭ neniu el ili komencis kunlaboron, en la ceteraj 4 distriktoj provizore esperantistoj ne ekzistas." Ni rigargas elserĉon de la distriktaj perantoj en ok distriktoj faro tre grava, eĉ se ili provizore ne estas ankoraŭ sufiĉe aktivaj. La movado jam tiros ilin kun si kaj ili vigliĝos dum la tempo. Ni tre konsilas al regionaj perantoj en ceteraj urboj provi sammaniere elekti siajn kunlaborantojn en ĉiuj distriktaj lokoj.

**Regiona konferenco de la IV-a regiono** okazis en Karlovy Vary la 13-an de Marto kunvokita de re-pe Fr. Patera kaj prezidata de MUDr Fr. Vaněk. Ĉeestis 19 membroj el Karlovy Vary, Cheb, Jáchymov, Mariánské Lázně, Březová, Ovesné Kladruby, Nová Role, Lesov. Estis pridiskutita situacio en ĉiuj distriktoj de la regiono. Ĝis nun estas esperantista vivo nur en Karlovy Vary kaj Cheb. En kelkaj distriktoj ne estas ankoraŭ konata esperantisto. Regiona peranto plendis, ke kelkaj distriktaj laborantoj ĝis nun eĉ ne provis kontakti kun li. Sed la diskuto estis esperiga. Oni sukcesis trovi distriktajn perantojn krom Karlovy Vary kaj Cheb por tri pluaj distriktoj, por la ceteraj (krom Aš kaj Podbořany) estis nomitaj „patronoj" el la aliaj distriktoj. Nomojn de la di-pe ni enpresas en Lokaj informoj sub titolo de la urbo. La regiono havas sume 10 distriktojn, do ĉiuj krom du estas prizorgataj. Tio ŝajnas al ni tre kontentiga rezulto de la konferenco, kies protokolo estas dokumento tre utila al nia organiza administrado. Estis reelektita reg. peranto Fr. Patera kaj tri liaj helpantoj: MUDr Fr. Vaněk, Nová Role, Fr. Mílek, Karlovy Vary, Koněvova 5, Fr. Mašek, Karlovy Vary (nun en Most).

**Ekzamena komisiono** kunsidis la 2-an de Aprilo en Brno je la 17 h en klubejo de E. K. en hotelo Passage. Ekzamenis unu senato (Dr Stan. Kamarýt, prezidanta, Rudolf Hromada, Teodor Kilian, Josef Vondroušek), prezentis sin al ekzameno 20 kandidatoj por la unuagrada kaj unu kandidato por la duagraga ekzamenoj.

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis Bohumil Bačina (Chomutov), Arnošt Baláš (Brno), Rajmund Bezděk (Brno), Josef Galla (Gottwaldov), Hilda Kořínková (Brno), Antonín Lecián (Veselí n. M.), Miroslav Novák (Brno), Josef Odehnal (Gottwaldov), Jiří Pastor (Horní Litvínov), Vlad. Patočka (Chomutov), Jiří Ploc (Chomutov), Anna Schartlová (Brno), Václav Smetana (Ostrava), František Svačina (Lanžhot), Josef Svoboda (Chomutov), Jan Šereda (Brno), Rudolf Trojna (Břeclav), Lumír Vodička (Boskovice), Miloš Zeman (Chomutov). Estis donitaj notoj: eminente 5, tre bone 9, bone 6.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis

Jaromír Pavlacký, komercisto en Veselí n. M. Lia hejma laboro estis: Gerundio.

La ekzamenitoj akceptu gratulon kaj dankon pro sia sindediĉo al lingvaj studoj en Esperanto.

**Originalaj poemoj esperantaj** estis temo de la Verda Stacio la 7-an de Marto je la 23,00—23,30 horoj. Reĝisoris Dal. Chalupa, deklamis Leraus, Švabíková, Bobek, Holmanová, Nývlt kaj aliaj, kantis Bartoš, pianoludis Letfus, anoncadis Slanina. La poemoj estis prezentitaj en kadro de dialogo inter Švabíková kaj Leraus, kiuj meritas laŭdon apartan. Pri kanto de Bartoš ni ripetu konstaton pri bonega komprenebleco; ĉe esperantlingvaj disaŭdigoj ĝi estas postulo nepra kaj ni laŭdu ĉiam, kiam ni rajtas tiel laŭdi. Kaj la anoncanton ni salutu pro la sama kaŭzo.

**Brita deputito Stephen Swingler**, kiu vizitis kiel oficiala gasto de nia registaro nian landon dum Oktobro kaj Novembro, alportis al ni saluton de la esperantistoj en Stafford. Ni petis lin pri simila servo kaj ni havas jam konfirmon el Stafford pri ĝoja akcepto de nia saluta letero kaj de esp. propaganda materialo pri nia lando. La sekretario de loka E-Klubo s-ro Edward Shaw, 25, Craddock Road, Holmcroft, Stafford, Anglujo, ŝatos trovi korespondanton en nia lando.

**Lingva Komisiono** de nia Asocio estas enskribita kiel Konsilanta Komitato de Akademio de Esperanto laŭ konfirmo de prez. Isbrucker el 29. I. 1949.

**En Japanio** aperis japanlingva 95-paĝa broŝuro „Venko de popolo en Ĉeĥoslovakio" kun fotografaĵoj pri februaraj okazintaĵoj en nia lando helpe de ĉs. esperantisto Josef Pošepný.

# LINGVO

## Traduko de la 20-a teksto:

Pri tio, kiel la kunlaboro kun Soveta Unio montriĝos[1] en la ĉeĥoslovaka ekonomio dum la unua jaro de la kvinjara plano, la prezidanto de la registaro[2] diris: La kuniĝo de la ĉeĥoslovaka ekonomio kun tiu de Soveta Unio en la unua jaro de la kvinjara plano plu(e) firmiĝos kaj plivastiĝos.[3] En la tuta ĉs. importo plenaj 20 % apartenos al la importo el Soveta Unio[4] kaj, same, el nia tuta eksporto iros al USSR[5] proksimume unu kvinono. Soveta Unio helpas al ni atingi altan konsumnivelon de nutrado, provizas nian industrion per krudmaterialoj[6] kaj duonfabrikaĵoj kaj liveros al ni iujn el la gravaj investartikloj.[7] Ĝi plue sekurigas la plenlaboradon[8] en nia malpeza industrio per tio, ke ĝi aĉetos grandan parton de ĝiaj produktoj, kiujn ni aliokaze[9] malfacile vendus en la mondmerkatoj.[10] kaj per kies produktado ni havigos al ni importon de necesaj krudmaterialoj en tre avantaĝa proporcio. Nia ekonomia kontakto[11] kun Sovetunio estas tre avantaĝa, ĉar ni importas 97 % da nutraĵoj, krudaĵoj kaj duonfabrikaĵoj kaj nur 3 % da pretaj produktoj,[12] dum ni eksportas 95 % da industriaj produktoj, inter ili plenajn 70 % da produktaĵoj de la nepezaj industrioj.

**Poznámky k úkolu 20.**

[1] sin vidiĝos, efikos (bude působiti); [2] ĉefministro; [3] pli ampleksiĝos, pli kreskos. Zde „rozšířiti se" znamená nabýti na objemu. Nikoli tedy disvastiĝi, jež užíváme ve smyslu rozšířiti se po různých místech (ĉien diskoniĝi, P. V.), na př. Esperanto disvastiĝis tra multaj lokoj de nia lando; [4] plenaj 20 % de (el) nia suma importo venos el S. U.; [5] USSR: Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj; [6] krudaĵoj; [7] investo-varoj, investo-valoraĵoj, investaĵoj. Nikoli: bieno = statek, zemědělské hospodářství; [8] okupatecon, laboreblon; [9] alie; [10] en la mondfoiroj; [11] niaj ekonomiaj rilatoj kun; [12] fabrikaĵoj. Hm.

## Traduko de la 21-a teksto:

1. Esti (man)atingebla, esti tuŝproksime; esti en paŝdistanco;
2. esti senhelpa; senrimeda; en embarasoj; forlasita; en prema, malfacila situacio;
3. havi monon; esti monposeda;
4. malsati; vivi en malsato, malsatante; suferi malsaton;
5. vivi per pano kaj akvo;
6. mi sentas min nebone, malbone; estas al mi malbone; mi sentas naŭzon;
7. estas hontinde por mi;
8. kelke da groŝoj ne gravas por ni; la kelkaj groŝoj estas bagatelo por ni;
9. gravas nur komenci; nur komenci estas malfacile;
10. kelke da tagoj pliaj ne gravus;
11. ni ĉiuj devas morti, estas mortontaj;
12. ili devis leviĝi (ellitiĝi) antaŭ la kvina (horo);
13. ŝi devis iri preter la domo; la vojo ŝin kondukis preter la domo;
14. la nunaj viroj neniom valoras, taŭgas por nenio;
15. ne fidu arbaron kaj akvon; arbaro kaj akvo ne estas fidindaj; ne (estas) konsilinde fidi al arbaro kaj al akvo;
16. kvazaŭ la tuta beleco ne ekzistus por ŝi; kvazaŭ la tuta beleco ne estus inda je ŝia interes(iĝ)o;
17. kio por la tero — la suno, tio por la homo — la amo; la amo tiom por la homo, kiom la suno por la ter' (Zedník).

**Poznámka k úkolu 21.**

Shora uvedené překlady nikterak nejsou jedinými možnými. Ale zdály se mi ze všech možných nejvýstižnějšími. Leckterému rčení je možno rozumět několika způsoby, proto i různé překlady. — Tento druh úkolů potěšil mnoho čtenářů; jejich dopisy lze vyjádřiti výzvou Dr Frant. Vaňka: Bona ideo, daŭrigu!

**Oba dva překlady** (20. a 21.) zaslali: Bobek Al. (spolu Harcuba Jos., Matějec C. a Valešová Sl.), Turnov; Bystřický R., Cheb; Čížek Jar., Praha; Forejtová Zd., Teplice; Hladík Ant., Kostelec n. L.; Jandík R., Černilov; Jakoubě L., V. Hamry; Ježek J., Buštěhrad; Kořínek Jiří, Brno; Kuba F., Olomouc; Macek A., Pulgáry; Odehnal J., Gottwaldov; Dr Pavlík Rud., Ostrava; Schöblová Ant., Beroun; Ing. Tuháček Em., Olomouc; Dr Vaněk Fr., Nová Role; Vít Karel, Gottwaldov; Weinerová B., Hradec Král.; Zedníkovi, Modřany; Zmeškal Al., Praha.

**Pouze překlad 20.** zaslali: Bartoň Mir., Praha; Hopf J., Nové Sedlo; Košutek Jos., Mor. N. Ves; Růžička V., Podmokly; Vodička L., Boskovice.

**Pouze překlad 21.:** Havrda V., Praha; Hršel Zd., Hradec Králové; Kerekeš J., Vysoká; Kotrba V., Teplice; Ryba Fr., Chlumec n. C.; Tichota P., Karl. Vary; Vlčková B., Kladno.

Celkem 25 překladů č. 20. a 27 překladů č. 21. Knižní prémii zaslali jsme p. Ing. Tuháčkovi (př. 20.) a pp. Zedníkovým (př. 21.). Hm.

**Vortaro.** La aŭtoro dankas al ĉiuj, kiuj sendis siajn rimarkojn. Li petas la aŭtoro(j)n, kiuj sendis la ampleksan opinion pri la parto A—P, ke ili afable baldaŭ sendu ion similan pri la plua aperinta parto, aŭ rekte aŭ pere de Dro Kamarýt kaj informu, kiel oni respondu al ili.

Ni denove ripetas, ke ni estos dankemaj por ĉiu atentigo, utiligebla antaŭ la libra eldono de la vortaro.

Samtempe aperas paĝoj 153—168.

# LOKAJ INFORMOJ

**Boleradice.** — Ekspozicion aranĝitan la 1-an—2-an de Februaro de Ant. Frolíšek vizitis ĉ. cent personoj.

**Bohumín.** — En la dua kurso de la Fervoja esperanta rondeto la 21. X. 1948 — 6. I. 1949 ĉe fervojstacio Bohumín kun 26 partoprenintoj instruis fervoja oficisto Rudolf Kaminský ĉiulunde kaj ĉiuĵaŭde po 2 horoj en la fervojista lernejo, danke al rekomendo de la fervojdirekcio en Olomouc.

**Boskovice.** — La 1. II. prelegis Josef Friedrich al 16 p. pri Esperanto kaj ĝia praktika signifo. La prelegon aranĝis la Kleriga lernejo kun helpo de s-ano Lumír Vodička.

**Břeclav.** — Loka Kleriga Konsilantaro aranĝis la 13-an de Januaro 3 propagandajn prelegojn de s-ano Jos. Friedrich el Brno. La prelegon en industria lernejo aŭdis 485 lernantoj, en komerca lernejo 200 lernantoj. La vesperan prelegon ĉeestis sole 20 pers. — J. Friedrich instruis de 19. I. en Loka Kleriga Popola Lernejo 25 pers. (plejparte lernantojn de industria lernejo) laŭ Kilian. Ĉiujn preparojn aranĝis la loka Esp. grupo, speciale tre agema s-ano R. Trojna. La kurso finiĝis 5. IV. kun 18 p., kiuj ĉiuj aliĝis al la Asocio. — La 11. II. prelegis J. Friedrich al 100 soldatoj pri E.; prelegon aranĝis R. Trojna. — La klaso E 1 de la Industria lernejo korespondas esperantlingve kun Nederlando, Franclando kaj Japanlando. — E.-Rondeto aranĝos la 19. VI. ekskurson de sudmoraviaj esperantistoj al Lednice.

**Brno.** — Kurso por progresintoj en klubejo de hotelo Passage daŭras, vizitas ĝin ĉ. 40 personoj, instruas J. Friedrich, J. Kořínek, J. Vondroušek. Nova kurso por progresintoj estas gvidata depost la nova jaro por 20 personoj de J. Kořínek. Nova kurso por komencantoj komenciĝis la 4. II., partoprenas 40 personoj, instruas s-ano J. Vondroušek laŭ lernolibro de Kilian. La ambaŭ laste nomitaj kursoj okazas sub aŭspicioj de Instituto por modernaj lingvoj. Por la kurso por komencantoj varbis 600 afiŝoj en placa tipografia aranĝo dum pli ol 14 tagoj kaj gazetanoncoj. — Regula ĝenerala kunveno de la klubo okazis la 8. II. 1949. Estis elektita prez. J. Vondroušek, vicprez. J. Friedrich, I-a sekretario J. Kořínek, II-a sekr. M. Adamcová, kasisto T. Borkovec, bibliotekistino N. Zitová, komitatanoj R. Nečas, F. Vyskočil, vickomitatanoj J. Ambrož, M. Matoušek, revizoroj M. Němec, Stan. Sedlák.

**Brno-Židenice.** — La 16-an de Febr. estis elektita jena komitato: Prez. Milda Jakubcová (XV, Potácelova 70), vicprez. Arnošt Baláš, sekretario Miroslav Novák (XI, Jiráskova 20), kasisto Karel Touchin, revizoroj Jan Šereda kaj Vilém Zelníček, komitatanoj František Jakubec, Jan Strejček, Božena Hlaváčová.

**Česká Lípa.** — La jarkunveno de la Klubo la 11-an de Jan. elektis prez. Karel Bláha (třída Jiřího z Poděbrad 1435), vicprezidantoj Ludvík Pšenčík, Marie Mrkvíková, sekretario Jan Wildmann (Mikulášská 179), kasisto Bohumil Sobotík.

**Děčín.** — Kurso komencula kaj progresinta en Januaro —Marto (kurskotizo 130 Kčs kaj enskribopago 20 Kčs, studentoj, geknaboj kaj soldatoj duonon). Pri kurso ni legis en Esperanto-rubriko de bulteno de la Loka Kleriga Konsilantaro (Měsíční zpravodaj místní rady osvětové) el 1-a de Februaro.

**Dobruška.** — Kurso organizita de malnova samideano Fr. Ševc, librobindisto, esperantisto de 1908, dum Jan.-Aprilo, instruas prof. Borovka 25 p.

**Hradec Králové.** — Jarkunveno de EK. okazis la 19-an de Feb. en Adalbertinum. Post interesa kaj bela prelego de la plej juna vicprezidanto St. Váňa legis detalan raporton s-ano Pytloun, sekretario de la klubo. La sekretario respondis kaj ekspedis 1000 leterojn. Sekcio de skriba kurso instruis preskaŭ 100 personojn kaj nuntempe okazas en la regiono dekses kursoj por komencantoj kaj

du por progresintoj kun 340 partoprenantoj. Por klubaj kunvenoj estis aĉetitaj du projekciaj aparatoj kaj 15 filmstrioj. Kvin eksterlandaj esp. gazetoj estas je dispono por membraro kaj ĉiukvaronjare aperas ciklostilita kluba bulteno, kiun ricevas ankaŭ ĉiu membro de Amikaro (estas neesperantistoj, ili subtenas esperantan movadon per kotizo laŭ sia ebleco). La poŝkalendaro trovis preskaŭ ĉies plaĉon laŭ alvenintaj laŭdaj leteroj. Nia klubo estas en bona kontakto kun Loka Kleriga Konsilantaro. Samideano Sobišek, longjara kasisto, raportis detale pri financaj aferoj de la klubo. La klubo bezonus propran ejon, kie povus tuta laboro ankoraŭ pli disvolviĝi. Estis elektitaj: Prezidanto Jaroslav Dolanský, I. vicprezidanto Markéta Otčenášková, II. vicprezidanto Emil Beran, I. sekretario František Pytloun, II. sekretario Václav Dušek, kasisto Věra Černá. Membroj de la komitato: Fr. Šmíd, Vl. Forman, J. Sobišek, St. Váňa, M. Novák, J. Otčenášek, L. Rejtharová. — La 11-an de Dec. okazis kutima Zamenhof-vespero kaj Nikolao-festo. Pytloun prelegis pri vivo de Zamenhof, Lukáš deklamis siajn tradukaĵojn el la novgreka, koncertartistino samideanino Marie Jakoubková kaj pianoartistino Dana Motlová prezentis kantojn. Reĝisoris s-o Tuch. — Kursoj komencula kaj progresinta komenciĝis la 25-an de Jan. en ejo de Baza Faka Lernejo; kurskotizo 100 Kčs, enskribopago 50 Kčs. — La 8-an de Aprilo estis solene inaŭgurita propra klubejo en Jungmanova strato 1000, disponigita de la Loka Kleriga Konsilantaro kaj ekipita jam per mebloj parte donacitaj, parte malkare akiritaj. Propra klubejo estos grava apogo por laboremo de la klubanoj. Kunvenoj ĉiujn merkredojn. Gastoj bonvenantaj.

**Gottwaldov.** — En la sindikata Laborlernejo komenciĝis la 1-an de Sept. E-kurso por komencantoj kun 14 p., kurso por progresintoj kun 17 p. Gvidas faka inst. Frant. Blaha. La loka EK kunvenas ĉiun unuan lundon de monato en la Masaryk-lernejo. Programoj estas variaj: paroladoj kun filmoj aŭ diapozitivoj, komunaj kantoj kaj ludoj. Partoprenas meze 40 personoj.

**Cheb.** — Jarkunveno la 26. I. elektis prezidanton Roman Bystřický (U gregoriánů 10), sekretariinon Marie Krieglerová (Montgomeryho 13), kasistinon Pavla Mrázková (Britská 47). Distrikta peranto estas la prezidanto de la Klubo.

**Chomutov.** — Jarkunveno de la Loka Grupo okazis la 16. I. 1949 kun 40 p. En Horní Litvínov estis komencitaj 3 kursoj po 20 partoprenantoj helpe de Jiří Pastor. En industria lernejo komenciĝis nedeviga instruado de E. por 54 studentoj, gvid. de K. Mucha. Kultur-amuza fako, gvidata de J. Ploc, prezentis sin al la publiko en Horní Litvínov kaj Chomutov kun granda sukceso per ĉeĥa-esperanta scensekvo „Iru kun ni!" Tiu ĉi fako vokas por konkuro ceterajn E-Klubojn. La klubo aranĝas internan konkuradon en kolektado de malnova papero. Dum la jaro ĝi disvendis 150 ekz. de Kilian-lernolibro. La klubo dankas al s-ro Jos. Krajča pro disponigo de montra fenestro por esp.-ekspozicieto. — Estis elektitaj prez. Josef Vyskočil, vicprez. K. Wiederman, sekretario Karel Mucha, studento, ul. gen. Svobody 58, kasisto O. Hůska, bibliotekisto Vl. Patočka, protokolisto J. Svoboda.

**Chrastava.** — Post finiĝo de la kurso, kiun ni enskribis sur p. 14, ĉiuj kursanoj aliĝis al la Klubo. Paroĥestro P. Bohumír Obruča, kiu estis unu el la kursanoj, disponigis kaj ekipis klubejon en la paroĥejo, kie kunvenas membroj ĉiujn lundojn je la 18-a horo. En la unua kunveno estis elektita komitato: Prez. Anna Obručová, vicprez. Marie Krátká, sekretario Václav Levora (Andělohorská 9), kasistino Marie Řádková, protokolisto Lad. Mlejnek, anoj Boh. Brodský kaj Jan Obruča, revizoroj Bohumír Obruča kaj Anna Jirošová. — La 7-an de Marto komenciĝis kurso por progresintoj.

**Jáchymov.** — Distrikta peranto Sv. Humpa, Stalinova 45.

**Jihlava.** — La 11-an de Aprilo okazis fonda kunveno de la Loka Grupo Asocia en Grandhotelo. Estis legita salutletero de T. Kilian kaj estis elektitaj prez. Jan Zeman, vicprez. R. Policarová, sekretario Evžen Kunst, kasisto Boh. Bohatý, protokolisto Stan. Coufal. El la plano por plua laborado plej signifa estas jam komencita kunlaboro kun Asocio de Ĉeĥa Junularo. Prepara komitato prezentis jam al la fonda kunveno bele ciklostilitan bultenon „Jihlava Esperantisto", 10 paĝoj, redaktataj de Jenda Zeman, redaktoro de Práce. La gazeto enhavas tekstojn el Schulhof, el Zamenhof (parto el Marta) kaj el Privat (La unua mondkongreso el Vivo de Zamenhof). Tiuj klasikaj tekstoj estas eminentaj instruiloj por novaj adeptoj de la lingvo. En la unua numero komencas kurso elementa, verkata de J. Zeman. Per rubriko „La mondo ridas" kaj „Akrigilo de spriteco" la tre interesa kajero finiĝas. Ĝi aperados monate. Gratulon al la redaktinto kaj eldonintoj.

**Josefov.** — La klubo de Jaroměř kuniĝis kun tiu de Josefov. De nun estas adreso komuna por la ambaŭ kluboj: Eva Figurová, Na trati 138, Josefov.

**Karlovy Vary.** — Nia kluba vivo vigle pulsas, la kunvenoj okazas regule. Ni fieras pri malgrandaj sukcesoj (du stacidomaj tabuloj jam pendas en ambaŭ niaj stacidomoj, la loka baneja gazeto publikigas depost nun ankaŭ esperantajn artikolojn, niaj anoj gvidas samtempe kvar kursojn, ne tro multnombrajn, sed tamen esperplenajn, ktp.). Bedaŭrinde ni perdis nian fervoran sekretarion, s-anon František Mašek, kiu transloĝiĝis al Most. Ni deziras al li plenan sukceson personan kaj profesian. Li certe penos verdiĝi la gravan industrian urbon Most. Nova sekretariino de nia klubo ekfunkciis: F-ino M. Žahourová, Karlovy Vary III, Dr Edv. Beneše 4. Ŝi fariĝis ankaŭ distrikta perantino. La bibliotekon transprenis s-ano Mil. Schovanec. — Por la 8-a de Majo ni preparas kune kun chebaj samideanoj majan ekskurson al Andělská Hora kaj Kysibl.

**Kladno.** — La kluba ejo estas nun en la Domo de ripozo (iama Dům oddechu Spoj. oceláren) en Huťská ul. Kunvenoj marde je la 19-a horo. Denove fariĝis membro s-ro Otomar Kočí, unu el la Esperanto-pioniroj en Kladno, kiu estis esperantisto jam antaŭ la unua milito, kaj ĉe kiu estis konservitaj ankoraŭ multaj dokumentoj el tiu tempo. Unu samideano el Usono abonis por nia klubo „Heroldon" por tiu ĉi jaro (kaj ankoraŭ por kelkaj aliaj kluboj). Ni dankas elkore lian afablecon!

**Kolín.** — Ĝenerala kunveno la 27. I. elektis dum ĉeesto de 13 p. prezidanton Jan Janda (IV, Komenského 194), vicprezidanton Josef Chmelík, sekretarion Ludvík Živný (IV, Táboritská 427), kasiston V. Karel. Kunvenoj ĉiun duan kaj kvaran ĵaŭdon en Lidový dům (apud urbodomo).

**Kopřivnice.** — Kurso aranĝata de Loka Kleriga Konsilantaro komenciĝis en Decembro 1948, instruas Rud. Zanáška laŭ Kilian-lernolibro 15 p.

**Kraslice.** — Distrikta peranto F. Kutil, c/o f-ao Amati.

**Kyšperk.** — Nova kurso de Febr. por 25 gelernantoj de la meza lernejo gvidata de Fr. Pytloun el Hradec Král.

**Liberec.** — El detala raporto prezentita de la prez. Ing. K. Fanta al la ĝenerala kunveno de la Klubo la 6. II. 1949, ni enskribas tion nediritan en informoj jam presitaj: Ago-komitato en Marto 1948 eksigis du membrojn. Dua kurso (Sept.-Dec.) gvidita de St. Knížek ankaŭ estis finita per ekzameno de 18 kursanoj (fare de inĝ. K. Fanta) kaj kursfina festo, same kiel la unua kurso, en Majo, kie ekzamenis 16 kursanojn Fr. Pytloun. La kursfinaj festoj multe helpis al reciproka interkonatiĝo de membroj kun novaj partianoj de la movado. Perfektigaj kunvenoj por la progresintoj daŭris la tutan jaron ĉiujn mardojn, kelkaj el ili estis tre sukcesaj. En la lasta tempo oni sukcesis ankaŭ solvi demandon pri lingva perfektigado de tiuj, kiuj finis la elementajn kursojn. Ĉiujn ĵaŭdojn okazas perfektiga kurso, kiun gvidis Ing. K. Fanta uzante metodojn, bazitajn sur bonhumoro. — En Somera Esp. Lernejo en Doksy partoprenis 5 membroj, en ideologia seminario 3 (Fanta, Blecha, Novotný). Ili en speciala membra kunveno donis al la membraro resumon de la tuta tie prezentita materio. S. Knížek organizis du kunvenojn kun polaj samideanoj el Jelenia Góra (sur Sněžka kaj sur Tvarožník). — En Novembro ricevis la Klubo novajn ejojn en Šamánkova 4a. Temas pri ĉambroj tre ampleksaj, kiuj estis adaptitaj per kunlaboro de libervolaj membraj brigadoj kaj ekipitaj per taŭgaj mebloj. Grandan dankon meritas konstrua departemento de Centra Nacia Komitato kaj afableco de nia membro Ing. Řihák. La ĉambroj povis esti disponigitaj, ĉar ili ne taŭgas por loĝejo; sed por klubaj ejoj estas tre taŭgaj kaj donos al la Klubo eblecojn pro disvolvo de tre ampleksa laboro. — Semajna rubriko en Stráž severu aperadis regule redaktata de prez. Fanta. Depost Aprilo 1949 transprenis la redaktadon Miloš Brunclík. La Klubo eldonas ciklostilitan bultenon „Nia vojo". En 1948 aperis du numeroj, redaktataj de Ing. Fanta kaj de li ankaŭ skribataj kaj multobligataj. — La jarkunveno signifis ankaŭ la 30-jaran jubileon de la

Klubo. Estis invitita unu el fondintoj de la klubo, Miloš Lukáš, kiu prelegis pri tiama situacio kaj laborado. Lia prelego estis aŭskultata kun atentemo kaj kun entuziasmo estis akceptita lia poemo, dediĉita al la EK en Liberec. — Estis elektita jena komitato: Prez. Ing. Karel Fanta, vicprez. kaj kultura referanto Otta Mader, sekretarioj Aug. Chlum, Milada Grundmanová, Vlad. Havlík, kasisto Stan. Jirásek, propaganda kaj radio-ref. Lad. Blecha, preso-referanto Miloš Brunclík, distroj-referanto Boh. Uhlíř, junularo-ref. Marie Effenbergerová, klubejestro Ing. Alois Řihák, mastrino Magda Lutovská, bibliot. kaj arĥivo Rudolf David, kestoj Jindřich Prokš, protokolisto Josef Bednář, skoltisma ref. Boris Hlaváček, regiona peranto Teo Novotný, revizoroj Břet. Bím kaj Boh. Haken. Anstataŭantoj Vojslav Pytloun, Jan Kalina, Pavel Brycknar, Karel Záhorský, Miloš Brunclík, Božena Tomešová. — Loka Kongresa Komitato konstituiĝis en komitata kunveno la 16. II. jene: Prez. Ing. K. Fanta, vicprez. Otta Mauder, sekretarioj Aug. Chlum, Milada Grundmanová, Vlad. Havlík, kasisto Stan. Jirásek, prop. referantoj Otta Mader kaj Lad. Blecha, preso-referantoj M. Brunclík kaj Amalie Kalinová, loĝiga ref. Ing. Al. Řihák kaj Jan Ryška, distraĵoj-ref. V. Pytloun kaj Teo Novotný, organiza ref. Ing. K. Fanta kaj Miloš Brunclík, revizoroj B. Haken kaj B. Bím.

**Liptovský Hrádok.** — La unua skolta grupo propagandas Esperanton sur sia informtabulo surmetante tie afiŝojn, poŝtkartojn, gazetojn.

**Mariánské Lázně.** — Distrikta peranto Ota Pavelka, lernejestro, Ovesné Kladruby u Mar. Lázní.

**Mladá Boleslav.** — Jarkunveno de la Loka Grupo la 25-an de Jan. elektis honora membro s-on Čeněk Nejedlý, lernejan inspektoron, kiu havas grandajn meritojn pri disvastiĝo de Esperanto en lernejoj de siaj distriktoj. Lernejajn kursojn gvidas Karel Šolc kaj Ant. Rauvolf; en lernejo en Březno instruistino Drábová. La regiona peranto helpis al stariĝo de Lokaj grupoj en Mimoň kaj en Jičín, kiuj ambaŭ vigle vivas. Agado de la lokaj grupoj estis pli intensiĝita per vico de prelegoj kun lumbildoj, kiun aranĝas la Loka Grupo en Mladá Boleslav. La grupoj interesataj anoncu sin tuj! Multon helpus reciproka korespondado de nove stariĝitaj grupoj en la regiono; tiuj, kiuj volas provi tiun ĉi metodon, anoncu sin ĉe s-o Karel Šolc en Mladá Boleslav 41/I.

**Moravany u Pard.** — Dank' al aktiva subteno de la Sokol-societo kaj de sokol-fratoj Cejnar kaj Malý vekiĝis intereso por Esperanto. En Januaro komenciĝis kurso, kiun regule vizitas 8 lernantoj; gvidas ĝin M. Kurz, eksdelegito de Patrovgrad en Jugoslavio. La Pardubicea klubo pruntedonis sian Esperanto-diapozitivon.

**Nový Bydžov.** — Kurson por 30 p. gvidas dum Feb.— Aprilo instruisto Lauterbach el Chlumec n. C.

**Nymburk.** — Post 10-jara paŭzo refondiĝis la 4. II. loka E-Klubo. Provizora komitato: Prez. Jos. Bukva, sekr. Fr. Kašpar, kas. Jos. Klicpera. Dek membroj. En kurso komencita 11. II. instruas 15 p. s-o Jos. Novotný, pastro de ĉs. eklezio.

**Olomouc.** — En jarkunveno de la E. Societo estis la 10-an de Febr. elektita sekva komitato: Prez. Dro Vladimír Mohapl, vicprezidantoj Frant. Kuba kaj Ing. Alois Gicklhorn, sekretarioj Josef Vašek (XI, Polská 2) kaj Jar. Karhan, kasistino Marie Kubová, kultura referanto kpt. Adolf Beneš, socia ref. Anna Šmoldasová, propaganda ref. Vlast. Blažek, presoref. maj. Josef Mareš, refer. pri junularo Jaroslav Motel kaj Emil Kohoutek, programgvidanto Josef Vašek, bibliotekistino Marta Wadasová, propag. aranĝantoj Josef Všolek kaj Emil Kohoutek, anoj Ing. Jaromír Řebíček kaj Bohuslav Novotný, anstataŭantoj Ludmila Holoubková kaj Milada Hubáčková, revizoroj Frant. Pospíšil kaj Ella Šrámková.

**Opava.** — En Kleriga Bezruč-lernejo estis malfermitaj ankaŭ en printempa duonjaro novaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj kun 64 partoprenantoj. Kursojn gvidas s-ano Vladimír Slaný el Ostrava dufoje semajne lunde kaj vendrede en gimnazio. — Kluba sekretario škpt. Ota Erben verkis propagandan diskurson, kiun legis trifoje en la endoma lerneja disaŭdigo studento de la 4-a klaso de la Komerca lernejo Jaroslav Kuzník.

**Ostrava.** — Ĉe Masaryk-popollernejo en vintra kaj printempa semestroj 1948—1949 estis malfermitaj kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj kun 35 partoprenintoj. Ambaŭ kursojn gvidas s-ano Vladimír Slaný, ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto. (V. S.)

**Ostrava-Vítkovice.** — Ĉe duagrada lernejo estis fondita Esperanto-interesrondeto, al kiu aliĝis 100 gelernantoj. Instruado okazas dufoje semajne kaj gvidas ĝin diplomita instruisto de Esperanto Jaroslav Bujas. Gelernantoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Samideanoj, skribu al ili, ĉar nur tiamaniere ni povas ilin daŭre gajni por Esperanto. La leterojn kaj poŝtkartojn adresu: S-ro Jaroslav Bujas, faka instruisto, Ostrava-Vítkovice, Švecova 34. (V. S.)

**Ostrava-Zábřeh.** — Jarkunveno de Esperanto Societo Komenský la 13-an de Februaro elektis: Prez. Alois Kubala (Rodinná 45), vicprez. Josef Weiss kaj Jindřich Volký, sekretario Boh. Vaněk, kasisto Karel Petřík. Honora prezidanto estis elektita Eduard Sedláček, teknika oficisto el Hrabůvka.

**Pardubice.** — E. K. Dro Schulhof elektis en sia jarkunveno la 4-an de Marto jenan komitaton: Prez. Růžena Veverková, vicprez. Jar. Černý, sekretario Frant. Nálevka (hlavní pošta), kasistino Marie Udržalová, protokolistino Anna Schejbalová, bibliot. Anna Boušková, arĥivistino Frant. Svobodová, revizoroj Ant. Jandík, Jan Dušánek. — Instituto de modernaj lingvoj ROH kune kun la Klubo okazigas kurson por 12 p. gvidatan de la kluba sekretario Frant. Nálevka; la kurso komenciĝis la 15-an de Marto en Komerca akademio kaj daŭros 20 lecionojn (laŭ lernolibroj de Kühnl kaj Kilian).

**Plzeň.** — Aŭtunaj kursoj de „Kulturo": Komencula 22. IX.—1. XII., gvidita de Burda laŭ lernolibro Petro por 30 p. Komencula en Telegraf-konstrua ofico dum Oktobro—Januaro, gvidita de s-o Reiser laŭ Kilian-lernolibro por 20 p. kun aŭspicioj de fabrika ROH-grupo kaj de fabrika grupo de Komunista partio. — Kunvenoj de Junulara fako de Kulturo depost 27-a de Sept. ĉiun lundon gviditaj de s-o Blažek estis speco de progresinta kurso por meznombre 30 partoprenantoj. — Dum Novembro estis farita kolekto inter membraro de Kulturo por strikantaj ministoj en Francio; la rezulto 1570 Kčs estis sendita al ÚRO.

**Plzeň.** — En komuna kunveno la 7. I. en la Kulturdomo (Gorkého 1) kunfandiĝis laborista E. Societo Kulturo kaj Klubo de Orientbohemiaj Esperantistoj en grupon de nia Asocio titolitan: EAČSR, loka grupo Plzeň. Estis elektita sekvanta komitato: Prez. R. Burda, vicprez. V. Skala, sekretario J. Reisner, prot. J. Pelcman, kasisto St. Šimák, bibliotekistino B. Kalná, anstataŭantoj J. Paterová, A. Fornousová, J. Kohout, revizoroj Ing. R. Novák kaj M. Racek. Kiel honora prezidanto estis elektita la plej maljuna pioniro de la movado Fr. Kavan. La kunveno aprobis kvinjaran planon por sia agado, kiu konsistas en: 1. Aktiviĝi dum la jarkvino ĉiujn esperantistojn en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo kaj pligrandiĝi nombron de anoj de la loka grupo en ĉiu jaro je 100 % laŭ sekvanta tabelo: En fino de la jaro 1949 - 100 membroj, en 1950 - 200, 1951 - 400, 1952 - 800, 1953 - 1600 membroj. Oni atingos tion per intensiĝo de la propaganda agado, daŭraj kursoj, prelegoj de enlandaj kaj eksterlandaj samideanoj, distraj entreprenoj, komunaj ekskursoj ktp. 2. Unuan de Majo, festo de laboruloj, partopreni en la procesio kiel aparta grupo. 3. Dum la jarkvino dissendos membroj de la grupo 50.000 leterojn, informantajn laŭ vero fremdlandon pri Ĉeĥoslovakio kaj ĝia vojo al socialismo. 4. a) Kiom permesos financaj cirkonstancoj ĉiuj fariĝos SAT-anoj. b) Sendos en Parizon al la 22-a SAT-kongreso 100 perfektajn esperantistojn. c) Invitos la 23-an SAT-kongreson en Plzeň. 5. Edukadi membraron al socialismo. — Ĉiuj Asociaj Lokaj Grupoj estas vokataj al konkurado pri punkto unua!

**Podmokly.** — Nova kurso komencula depost la 25. I. en Knabina lernejo sur Mácha-placo, instruas Chmel kaj Babička 25 p. tute novajn en la movado. En la progresinta kurso instruas Růžička 30 p. — La 8-an de Febr. prelego de J. Vítek pri „Danlando post la lasta milito". — La Klubo prizorgas 3 proprajn kestetojn, kie estas la materialo ofte ŝanĝata. — Jarkunveno de la Loka Grupo la 24. II. dum ĉeesto de 21 anoj elektis: Arnošt Chmel, prez.; Vlast. Pössnicker, vicprez.; Václav Růžička, sekretario; Mir. Jelínek, kasisto; V. Tichý kaj M. Čekal, revizoroj; Jar. Babička, Vrat. Mír, Marie Dvořáková, Anna Balšánková, Božena Štréblová, komitatanoj; Josef Hamele, Věra Bartošíková, Josef Trekoval, vickomitatanoj. Raportanto por preso estas Miroslav Jelínek (IV, Tržní

197), al kiu estu sendataj ĉiuj sciigoj por preso. En la jarkunveno ĉeestis maljuna samideano Göll, kiu rakontis pri siaj spertoj, travivitaj dum ses universalaj kongresoj, kiujn li partoprenis dum sia vivo. La prezidanto petis la membrojn, ke ili fervore kunlaboru en kolektado de malnova papero, kaj rekomendis aliĝon al la Kolegio en Doksy.

**Praha.** — Tramistoj en tramremizo Praha-Žižkov (unu el ok tramremizoj) komencis en Januaro Esperanto-kurson laŭ Kilian lernolibro. Aliĝis 15 tramistoj, sed pro la malregula deĵoro ne ĉiuj povas partopreni. Ilia celo estas ekkontakti kun tramistoj de la tuta mondo kaj pri siaj labor-, viv- kaj salajro-kondiĉoj raporti en faka gazeto. Ili jam korespondas kun tramistoj de dek landoj: Anglio (Glasgow kaj Sheffeld), Aŭstralio (Adelaide), Aŭstrio (Vieno), Bulgario (Sofia), Francio (Marseille), Germanio (Dresdeno), Hungario (Budapesto), Nederlando (Den Haag kaj Rotterdamo), Norvegujo (Oslo), Svedio (Stokholmo). En ceteraj landoj la kontaktoj estas serĉataj. Ili laboras por fondi ĉe Esperantista Klubo en Praha la sekcion de dungitoj en transporto (de transportistoj) kaj en Kultura domo de ĉs. poŝto aranĝi kursojn, kie povos partopreni ankaŭ tramistoj de la ceteraj remizoj. (J. Čížek, Kněžská luka 2123/55, Praha XI-78.)

**Příbor.** — Sur ambaŭ mezlernejoj en Příbor estis kreita interes-rondeto esperanta en monato Oktobro 1948. Rondeton gvidis kaj instruis Ant. Sattek, instr., unufoje semajne regule po 2 horoj (ĉiu rondeto). En ambaŭ rondetoj estis 50 lernantoj, kiuj estis instruataj laŭ Ĉe-metodo. Instruas Ant. Sattek, instruisto de mezlernejo en Příbor. Interes-rondeto esperanta por knaboj ne estis aprobita de Regiona lerneja komitato, pro tio ĝi ĉesis ekzisti fine de monato Februaro 1949. Plej fervoraj knaboj de tiu rondeto transiris en rondeton de knabina mezlernejo, kie ili daŭrigas en studado de Esperanto. La nombro de transirantaj estas 10 knaboj. Do nuntempe estas nur unu esperanta interes-rondeto, kie estas 35 lernantoj, kiuj regule unufoje semajne estas instruataj po 2 horoj. — Ankaŭ Esperanto-kurso por plenkreskuloj estis malfermita en monato Novembro (19. XI. 48) kaj finiĝis 21. II. 1949. Aliĝis 13 p. Instruis unufoje semajne po 2 horoj vespere (inter 19—21 horo) Ant. Sattek, instruisto, al kiu helpadis kiel „esperanta transformanto" samideano Johano Štěpán. Instruado estis laŭ Ĉe-metodo (plejparte). — En la knabina mezlernejo estas aranĝita konstanta surmura gazeto „Esperanta anguleto", el kie estas regule informataj lernantinoj pri esperantaj aktualaĵoj. — Okaze de instruista kunveno en Januaro 1949 estis por geinstruistaro aranĝita malgranda ekspozicieto de esperanta literaturo.

**Sezimovo Ústí.** — Kurso en fabriko Svit por 20 p. gvidata de Fr. Švarc en Januaro—Marto.

**Tábor.** — Post vizito de danoj kaj post koncerto de s-ino Santreuil ekestis en Tábor pli granda intereso por Esperanto. Esperanta Klubo aranĝis tial kursojn por komencantoj. Aliĝis 60 partoprenantoj. La aliĝintoj devis esti dividitaj en du klasojn. La 25 kursanojn instruas dro Zbyněk Dvořák laŭ lernolibro de Kilian. La duan klason (35 partoprenantoj) instruas Frant. Knotek laŭ Ĉe-metodo. Krom tio de komenco de la lerneja jaro instruas dro profesoro Jokl 35 studentojn de 1-a gimnazio laŭ lernolibro de Kilian. La studento Eŭgeno Jokl instruas Esperanton en sia klaso laŭ lernolibro de Kilian 7 studentojn. En komerca akademio lernas Esperanton de Septembro 1948 43 studentoj. La kursojn tie gvidas inĝ. Shánělec kaj inĝ. Svoboda laŭ lernolibro Kilian. La dua gimnazio ricevis de ministerio por instruado permeson fondi esperantan interes-rondeton. Tie instruas s-ano F. Knotek de 3. I. 1949 laŭ Ĉe-metodo. — El la kursoj aliĝis al la Klubo 30 novaj membroj. Estis akceptitaj en solena kunveno; oni prelegis, deklamis poemon de Pumpr, kantis laŭ Filip kaj Lukáš, Jan Skalický ludis violonon, Rudolf Preclík sorĉis laŭ ĉiuj reguloj de magia arto, Jitka Pastrňáková rakontis anekdotojn, kiujn novaj adeptoj penadis ripeti. En Zamenhofa vespero paroladis Elizabeta Frolíková el Písek pri universala kongreso en la jaro 1937, montris propraјn fotojn de naskiĝdomo de la Majstro, straton kaj domon, kie li vivis kaj lian tomban memorŝtonon. — 7. III. 1949 havis astronomian prelegon kun teleskopa observado de la ĉielo K. Voňavka. — La Klubo ekrilatis kun la Distrikta Kleriga Konsilantaro. De ĝi eldonita libro Táborsko, srdce jižních Čech estas por esperantistoj havebla por duona prezo 25 Kčs. Propra banloko ĉe grandega fiŝlago Jordán estis akirita de Vlasta Dosoudilová por nia klubo. — Laŭ propono de regiona peranto Francisko Knotek oni en la klubo parolas nur esperante.

**Třebíč.** — La ĝenerala kunveno de la Loka Grupo, okazinta la 14-an de Februaro, elektis la sekvantan komitaton: prezidanto Th. Kilian, vicprezidanto Jan Dokulil, sekretario Josef Poláček, kasisto Karel Turek, protokolisto kaj arkivisto Josef Hnízdil, ano B. Zahrebelná. Anstataŭantoj A. Brabec, Dr Karel Englisch, L. Krčová, H. Procházková; revizoroj L. Křepelová, Fr. Nestřeba; anstataŭanto Ant. Maloušek.

**Turnov.** — La 25-an de Januaro elektis la jarkunveno prez. Frant. Toman (Havlíčkova 1), al kiu estu sendataj korespondaĵoj, vicprezidanto St. Samek, sekretariino Růž. Hejnová. Kunvenoj ĉiun unuan kaj trian mardon en la monato. Dum la jaro 1948 membroj de la grupo akceptis el la fremdlando 74 leterojn kaj forsendis fremdlandon 76 leterojn.

**Velké Pavlovice.** — Ekspozicio aranĝita de Ant. Frolíšek en Augusto vekis atenton de publiko.

**Veselí n. M.** — Loka Kleriga Konsilantaro decidis aranĝi kurson. La kurso estas 10semajna, de la 17-a de Januaro ĝis la 24-a de Marto, ĉiulunde kaj ĵaŭde vespere en lernejo kaj vizitas ĝin 35 personoj en la aĝo inter 14 ĝis 40 jaroj. Gvidas J. Pavlacký.

**Vítkov u Op.** — La unua kurso komencula finiĝis la 5-an de Februaro kun 23 partoprenintoj. La 8-an de Februaro estis komencita kurso por progresintoj kun 20 p., kiu finiĝis la 19-an de Marto per „Jozefa vespero", kies programo tre plaĉis. Antaŭ la programo prelegis ŝkpt. Ota Erben pri signifo de E. en nuntempo kaj en estonteco kaj akiris per sia parolado pluajn adeptojn de nia movado. Ĉeestis gastoj el Ostrava, Kopřivnice kaj Bohumín. — La 20-an de Marto okazis konferenco el Ostrava-regiono, kiun prezidis Vlad. Slaný. — Provizora komitato de la fondata Loka Grupo estas: prez. Jan Witoszek, vicprez. Em. Sýkorová, sekretario Adolf Chromčík (Družstevní 289), kasisto Ant. Remeš, propagandistino Marie Eichlerová, bibliotek. Miloš Racek, anoj J. Kučerová, Zd. Holáň, L. Coufal. Kunvenoj ĉiun vendredon je la 20 horo en hotelo Růže.

# SCIIGOJ

### La kongreso en Bournemouth

La ministerio de informado permesas la partoprenon en la ĉijara universala Esperanto kongreso al 5 ĉeĥoj. — Interesatoj skribu tuj (sen dokumentoj) al Josef Vítek, Na Zderaze 3, Praha II. — Speciala komisiono de Asocio elektos la kvin, kaj informos ĉiujn pri la rezulto. Ĝi konsideros sole tiujn, kiuj partoprenis en decembro la kleriĝan kursaron de la ministerio de informado kaj perfekte estras la lingvon.

Kongreso en Bournemouth, 6—13 Aŭgusto 1949. Somera universitato. — La programo estas preskaŭ kompleta kaj verŝajne okazos jenaj prelegoj: Prof. W. E. Collinson, La gramatika strukturo de la angla lingvo kompare kun tiu de Esperanto. Prof. G. Warighien, La detektiv-romano. D-ro L. Izák, Slovakaj stalaktitaj grotoj. D-ro P. Neergaard, Ŝimfungoj en la hejmo. E. L. Johnson, Internaciaj edziĝoj kaj privata internacia juro. E. D. Durrant, UNESCO. Rektoro K. Söderberg, Demokrata edukado. St. Ĝuĝev, Kiel kreskas kaj disvastiĝas la lingvoj. — Aliĝoj: Ĝis la 14-a de Marto aliĝis 1106 kongresanoj el 26 landoj. Inter ili 7 el Ĉeĥoslovakio.

**Skandinavia Aerlinia Sistemo** (Scandinavian Airlines System) kies centro estas en Kopenhago aperigis tre bele presitan broŝuron, el kiu ni ekscias, kion ni ne sciis ĝis nun, ke el Kopenhago oni fluas direkte al Teheran, Nairobi, Dakar, Montevideo, Gander, New York neparolante pri lokoj eŭropaj. La tre interesa prospekto estas havebla ĉe SAS, reklama oficejo, Store Kongresgade 29, Kopenhagen K, Danlando.

**Monto Ĉantorya.** Jam de la jaro 1925 kunvenas ĉiam en Junio esperantistoj el Ostrava-regiono kaj Pollando sur tiu monto. Sur ĝia supro gvidas limo inter Ĉeĥoslovakio kaj Pollando. Tiu ĉi tradicia kunvenado de esperantistoj en libera naturo estis interrompita nur per okupacio kaj milito. Denove post 10 jaroj kuniris tie pasintjare gesamideanoj kaj renovigis tiun ĉi tradicion malgraŭ tio ke tiam preskaŭ tutan tagon daŭre pluvegis; kuniris 36 gesamideanoj kaj promesis al si, ke ili ĉiujare kunvenos dum Junio sur monto Ĉantorya kaj ligos tie fratajn rilatojn kun pclaj esperantistoj el apudlimaj regionoj. Venonta manifestacio de esperantistoj sub libera ĉielo sur monto Ĉantorya okazos la 26-an de Junio. Ĉiu, kiu volas ekkoni belecon de sileziaj Beskidoj, venu tien! (V. S.)

**Labora kunveno de regiono Brno** okazos 8. V. je la 10-a horo en Brno, hotelo Passage, Lidická 23. Temos ĉefe pri elserĉo de kapablaj prelegantoj kaj instruantoj de Esp. kaj pri ellaboro de plano por la aŭtuna sezono. Proponojn sendu al Repe Josef Friedrich, Brno, Hoblíkova 8.

**Internacia muzika kulturfesto (estejvodo) en Llangolen** okazos la 14—19-an de Junio. Esperantistoj estas invitataj konigi tiun ĉi aranĝon al ĥoroj kaj danctrupoj. La Rhos Esperanto-Grupo donas premion al tiuj, kiuj plenumis tiun peton. Rezulton de via agado anoncu al Esperanta sekretariino Ponciau, Wrexham, Britlando.

**Sveda radio dissendas esperantlingve** de la 3-a de Januaro aktualajn sciigojn pri svedaj aferoj kaj ankaŭ pri esperantistaj okazintaĵoj ĉiun lundon je la 10,15—10,30 horo sur 49,46 kaj 31,46 metroj kaj je la 18,15—18,30 horo sur 19,80 kaj 27,83 metroj kaj ĉiun mardon je la 4,15—4,30 horo sur 49,46 kaj 31,46 metroj (ĉs somera tempo). Konfirmojn pri aŭdo al Sveriges Radio Stockholm.

## Letní vyšší kurs esperanta v Karl. Varech (3.—16. VII. 1949)

**pořádá místní Esperantista Klubo. - Ubytování v pensionu (o 20 pokojích dvoulůžkových) spolu se stravou (5× denně) za 14 dní (včetně režijního příspěvku) 1100 Kčs.**

**Konversace, příprava ke zkouškám. - Vyučují členové zkušební komise Svazu. - Přihlášky na adresu: A. Reček, odb. učitel, Stalinovo náměstí 5, Karlovy Vary.**

### ESPERANTISTA VIVO

**Mortis** Ludvík Chrostek, lernej-direktoro en pens. en Ostrava, honora membro de E. Societo Komenský, la 26. VII. 1948.

**Mortis** Josef Dubný, la plej maljuna samideano en Ostrava-regiono, honora membro de E. Societo Komenský en Ostrava, la 26. XI. 1948.

Iliaj familianoj akceptu esprimon de nia kondolenco.

**Honoriĝo.** PhDr Jan Geryk, violonisto, atingis la 8-an de Aprilo post sia studado ĉe la Masaryk-universitato en Brno kaj Karlo-universitato en Praha doktoriĝon en filozofio en fakoj muzikscienco kaj sociologio.

**Edziĝo.** PhDr Jan Geryk, violonisto, kiu plurfoje jam prezentis ĉeĥan muzikon virtuoze al internacia publiko, kaj Zorka Mazlová la 17-an de Aprilo en Praha.

**Edziĝo.** RNC Jaroslav Hanuš, eksdirektoro de nia Scienca komisiono, kaj RNC Jiřina Málková la 23-an de Aprilo en Praha.

La ambaŭ geedzaj paroj akceptu esprimon de niaj amikaj bondeziroj.

**Mortis Vlado Jukl,** prof. de Komerca akademio en Bratislava, la 30-an de Aprilo 1949, nur 58-jara. Konsternitaj pro neatendita forpaso de unu el niaj plej bonaj amikoj, homo fidela, laboranto persista kaj sistema, instruisto eminenta kaj komplete dediĉinta sin al la edukaj taskoj, fakulo en stenografio kunhelpinta krei slovakan stenografian sistemon, funda scianto de faktoj kaj problemoj el prikomercaj sciencoj, esperantisto profunde konanta la lingvon, instruinta ĝin dum longa vico de jaroj en sia lernejo kaj seninterrompe aktiva en la movado, ni petas la familion akcepti nian plej sinceran kaj profundan kondolencon.

## Letní kolej esperanta v Doksech

(Somera kolegio de Esperanto en Doksy)

16.—30. VII. 1949

**III. zpráva:**

**L. K. E. D. uspořádá od 16.—30. července t. r. tyto kursy a společenské podniky:**

**1. Kursy: A. základní (názornou Cseh-metodou); B. pokračovací; C. konversační; D. seminář gramatický, literární a historický pro znalé espa, činovníky a kandidáty zkoušek; E. cvičný kurs pro učitele espa Cseh-metodou; F. esperantský kurs umění řečnického; G. cyklus esperant. přednášek z esperantologie a esperantismu. — Vyučují a přednášejí: Dr Kamarýt, prof. Kožený, Dr Pitlík, řed. Severa, uč. Slanina, Šolc a Špůr, Dr Vaněk, uč. Vítek a j. O účasti v kursech obdrží žactvo osvědčení. Vyučování bude denně od 8,30—12,30 hod. ve školní budově.**

**2. Společenské podniky: Seznamovací večírek, divadlo, karneval, benátská noc na Máchově jezeře, táborový oheň, celodenní autokarový výlet; odpol: koupání, veslování a plavecké závody na jezeře, besedy, výlety (pěší, drahou a po jezeře) do blízkého okolí (Staré Splavy, Bezděz) a j. — Informace o školném, ubytování a stravování viz ve II. zprávě! Přihlášky zasílejte na adr. K. Šolc, uč. esp., Mladá Boleslav I, 41, kursovné s ubytovným platenkou pošt. spoř. na šek. účet 729.501 Okres. spořitelny a záložny v Doksech u Máchova jezera s poznámkou „L. K. Esp.". — Vyžádejte si prospekt s přihláškou! Počet žactva omezen, přihlášky přijímají se jen do 20. června. (Další zprávy v příštích číslech.)** **L. K. E. D.**

K tomuto číslu je přiloženo pozvání na VII. sjezd československých esperantistů v Liberci 4.—6. června se zprávou o činnosti Svazu r. 1948. Prosíme, abyste mu věnovali pozornost a abyste se hlásili k účasti co možno brzy. Použijte k tomu přihlašovacího formuláře, jenž byl přiložen k 3. číslu. Nemáte-li ho, zašle vám jej Klub esperantistů v Liberci I, Šamánkova tř. 4a. — Zpráva o financích Svazu bude v příštím čísle.

### KORESPONDI DEZIRAS

Skolta grupo en **Wadowice** (Silezio, Pollando) serĉas kontakton kun samideanoj geskoltoj kaj gejunuloj en la tuta mondo, kiuj interesiĝas pri Esperanto-filmoj, precipe 16 mm larĝaj.

S-ro Karel Profous, laboristo, VI, 2033, **Varnsdorf,** ČSR, interŝ. gazetojn, PK.

Luiz Bartholomeu, Caixa Postal n-ro 232, **Bauru,** Est. de Sao Paulo, Brazilo. PM ĉeĥoslovakajn. Posedas nian katalogon Drufila 1949.

Prof. A. C. Reitzel, 87, rua do Sertâo, **Joâo Pessôa,** Paraiba, Brazilo, pri Sokol-movado. Intŝ. ankaŭ PM, PK. Por 300 PM kaj 50 PK li sendas la saman kvanton.

Interŝanĝi skarabojn kun eksterlandanoj dez. O. Marek, instruisto, **Žamberk** 797, ČSR.

Jan Hadámek, lernejestro, **Jakartovice** u Opavy, ČSR, kun la tuta mondo, intŝ. PK, PM, il. naciajn gazetojn kaj alumetskatolojn. Resp. tuj kaj ĉiam.

Junaj francaj metilernantoj, vizitantoj de faka lernejo, kun ĉeĥaj metilernantoj kaj junaj laboristoj. Adreso: Centre d'apprentissage, 85, Avenue du Pont Juvénal, **Montpellier** (Herault), Francio.

Klaso E 1 de Ŝtata industria lernejo, **Břeclav,** pri ĉiuj temoj. Respondo certa.

Právě vyšlo. — Dodává naše knihkupectví.

## O zkouškách z esperanta

**Všeobecné poučení a sylabus otázek.**

Cena 10 Kčs vyplaceně.

Objednejte složenkou knihkupectví Svazu číslo 12.371.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze XIX/7, p. přihr. 7075. Odpovědný zástupce listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne »Cíl« v Karl. Varech. Účast na poštovní novinové službě povolena řed. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohlédací poštovní úřad Praha 25.